EKO 2022
Esperiga Komuniko
Subtene al la regiona, landa kaj loka agado
UEA ilei IF EF
Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 62>** ● AMO 92 kaj 95 ● Komisionoj ● UEA kaj Erasmus+ **< nov. 8**

# AMO 92 – rezultoj el Kubo

Alkroĉita estas raporto de Maritza Gutierraz pri tiu seminario en la ĉefurbo, Havano. Kiu okazis en oktobro, kun ripeto decembre en la oriento de la lando, por enuafoje porti la AMO-programon al provinca urbo.

Instruado estis ĉefa programero, Prof. Julián Hernández pritraktis jenajn erojn:

- -Instruado de Eo laŭ komunika metodo. Rilatoj inter ĉefaj komponantoj de la metodo.
- -La lernociklo dum la instruado de Esperanto. Ekzercotipoj. (Inkluzivas interaktivan agadon)

Aliaj temoj rilatas al informado, varbado kaj organizaj demandoj. Partoprenos 15 geesperantistoj el Havano kaj la centra provinco Villa Clara. Nova sesio okazos en decembro en la orienta provinco Guantánamo, dum tutlanda renkontiĝo konata kiel Zamenhofa metiejo.

Ni alkroĉas la raporton de Maritza Gutierrez.pri la okazinta seminario en Havano.

# AMO 95 prepare

Jen la ligilo al la Eventa servo kie oni trovas la programon kaj ligilon por aliĝo al la 95-a AMO-Seminario. Tio okazos en la 11-a ĝis la 14-a de novembro kun la temo 'Vortara farado'. La seminario okazos en Zagrebo.

https://eventaservo.org/e/1280d9

Marija Belosevic

# Komisionoj por Eŭropo kaj Afriko

Ĵus aprobita de la Estraro de UEA estas la Komisiono pri Eŭropa agado – unuavice por kunordigi la agadon de la unuopaj landaj asocioj. Jen la akceptita konsisto:

Renato Corsetti - kunordiganto

Seán Ó Riain, Irlando: Sean.oriain@dfa.ie
Ileana Schrøder, Danlando: ileana.schroder@mail.dk
Radojica Petrović, Serbio: radojica.petrovic.rs@gmail.com
Pierre Dieumegard, Francio: pierre.dieumegard@free.fr
Luigi Fraccaroli, Italio: luigi.fraccaroli@esperanto.it
Margarita Želve, Latvio: margarita.zelve@gmail.com
Stefan MacGill stefan.macgill@gmail.com (komunikado)

Nun en preparo estas laborplano por tiu komisiono.

# Komisiono por Afriko

Dum sia kunsido de la 15-a de oktobro 2022, la Estraro de UEA unuanime aprobis la konsiston de la nova Afrika Komisiono de UEA, por la periodo 2022-2025.

La propono venis de la estrarano de UEA por Afriko, Jeremie SABIYUMVA, post konsultiĝo kun TEJO, ILEI kaj plurjaraj aktivuloj ekster kaj en la kontinento. La komisionanoj estas novaj en la komisiono sed ĉirkaŭ ili estas multaj spertaj esperantistoj. La unua prioritato de la novelektita komisiono estos subteni la okazigon de la unua afrika UK, laŭeble en 2024 (SMG: Kie kuŝas en UEA la decido pri tio!?). Ĝi havas ankaŭ prioritaton plifortigi la movadon en Afriko, inter alie per revivigo de la dormantaj Landaj Asocioj. En la nuna rapide moviĝanta mondo, la komisiono havos taskon adaptigi la movadon al la nunaj ŝanĝoj.

La komisiono zorgos pri la regula apero de la informbulteno Esperanto en Afriko kaj pri okazigo de la trijara Afrika Kongreso de Esperanto. Ĝi ankaŭ strebos starigi retradion kaj plifortigi retan instruadon de Esperanto. La komisionanoj kunsidis kaj elektis inter si kunordiganton, vickunordiganton, sekretarion kaj vicsekretarion.


La Afrika Komisiono kore dankas al la ĝisnunaj komisionanoj (2019-2022) pro la laboro por Esperanto en Afriko, kaj deziras sukceson kaj harmonian kunlaboron al la novenomumitaj komisionanoj, kies nomoj estas:

1. S-ro Patrick MANIRAKIZA: kunordiganto (Burundo)
2. S-ino Ranja Robertine Jeanne d'Arc ZAFINIFOTSY : vic-kunordiganto (Madagaskaro)
3. S-ro Koffitche KOUFIONOU: sekretario (Togolando)
4. Espoir NGOMA KASATI: vic-Sekretario (DR Kongo)
5. S-ino Miora RAVELOHARISON komisionanino (Madagaskaro)
6. S-ro John E. MAGESSA: komisionano (Tanzanio)

# Kosmos el la filozofio Martinus

La simbolo kovrile sur ilia revuo prezentas la kulminon de la mallumo. Per kosmaj analizoj ni povas ekvidentigi la solvon de la mistero pri la mallumo kaj la tiel nomata "malbono". La travivadon de "la malbono" kaŭzas manko de kosma scio kaj amo al la proksimulo. Kio gvidas en la kulmino de la mallumo tio estas la mortiga principo. Ĉi tiu principo konserviĝas per la travivado de malamikeco kaj la kredo je tio, ke troviĝas maljusteco. Kosme vidate neniu povas fari aŭ suferi maljuston. Centraj detaloj en la simbolo: La oranĝkoloraj kampoj plej malsupre, apartigitaj per flavaj

kampoj, simbolas vicon da enkarniĝoj de la estulo. La triangulo kaj la koro estas esprimo de la mio kaj la organismo de la estulo. La larĝa oranĝkolora arko maldekstre simbolas revenantan sortoarkon, kiu estas efiko de malbona aŭ malluma ago, kiun la estulo faris al sia proksimulo. La persono, la naturo aŭ la ilo, kiu aktivigas la revenantan malluman sortoarkon, estas perceptebla kiel malamiko aŭ maljusteco. Ĉi tio simboliĝas per la sabro maldekstre. Tiel longe la estulo ne komprenas, ke ĝi mem estas origino aŭ prakaŭzo al sia sorto, ĝi daŭrigas reagi mortige. Ĉi tio simboliĝas per la sabro dekstre kaj la oranĝkolora arko kiu iras supren kaj dekstren. Per tio aktiviĝas nova malluma sortoarko, kiu revenos al la homo mem. La kranio simbolas la malvarman percepton de la materiismo, ke la morto estas totala neniigo de la viva estulo. La fajromaro simbolas militon kaj mizeron. La vulkano simbolas kataklismojn. La radio-aŭreolo malantaŭ la noktonigra mortoĉielo de la materiismo kaj la sendieco esprimas la lumon de la altaj spiritaj mondoj.




# UEA kaj Kosmo kune pro Erasmus+

Universala Esperanto-Asocio, kunlabore kun Kosmo Strategio, invitas ĉiujn interesitojn, kaj aparte reprezentantojn de Landaj kaj Fakaj Asocioj, partopreni en reta informseminario pri la nuntempa eduka sepjara programo Erasmus+, subvenciata de Eŭropa Unio dum la periodo 2021-2027.

Atendante la lanĉon de la programgvidlibro 2023 kaj de la koncernaj limdatoj por forsendi novajn projektproponojn, dum organizita seminario eblis ricevi enkondukajn informojn pri la rolo kaj la funkciado de la eduka programo Erasmus+, pri la bazaj kaj nepraj antaŭkondiĉoj por partopreno, pri la avantaĝoj kiujn organizaĵoj povas ricevi danke al la partopreno en ĝiaj ĉefaj subkadroj.

La formo de la aranĝo ne estis nur prelegeca kaj statika: oni antaŭvidis ankaŭ interagajn, dinamikajn momentojn, specife strukturitajn por engaĝi la partoprenantojn, respondi iliajn demandojn kaj aŭskulti iliajn spertojn.

Aparta atento estis donita al la specifaj bezonoj de la reprezentataj organizaĵoj kaj al la temoj kiujn ili intencas ekpritrakti aŭ pluevoluigi en estontaj projektoj. Surbaze de la interesoj, de la bezonoj kaj de la temoj indikitaj de la diversaj organizaĵoj reprezentataj dum la seminario, postaj plukonkretigaj retaj sesioj sekvos dum la venontaj monatoj.

Fonto: Gazetara Komuniko de UEA

## Distanca Instruado en Afrika Universitato

La ektoro de la kongolandaj universitato UEC estas Élisée BYELONGO (Suda Afriko). Prezidanto de la nova fakultato pri Lingvoj, Esperanto kaj interlingvistiko estas Renato CORSETTI (Britio).

Ni dankas la helpon de la prezidanto de ILEI, Ahmad MAMDUHI (Irano), kadre de la projekto TIBOR SEKELJ. La franclingva distanca kurso komenciĝis jam en januaro 2021.

Ĉijare Renato CORSETTI registras la aliĝantojn al la retkurso. Agas Iinstruistino por la niveloj 1 kaj 2, Fransoazo (Françoise NOIREAU el Francujo), per ĉiutagaj franclingvaj lecionetoj per Vacapo (WhatsApp). Estas 6 subniveloj kaj 80 gestudentoj aktive respondas al la demandoj kaj progresas en mia programo.
Instruisto por la nivelo 3, d-ro Renato CORSETTI, kontribuas per intensaj regulaj rektaj videolecionoj per Zomo (Zoom).

Komenco de la universitata periodo okazis per parola ekzameno per Zomo (Zoom) antaŭ internacia ĵurio (kun Karine ARAKELJAN en Armenio), ene februaro 2023. Atestiloj kun emblemo de la universitato UEC, estas realigotaj de Hamzeh SHAFIEE.

## Eŭropaj iniciatoj plurlingve

De pluraj monatoj mi faris la retejon europokune.eu por konigi al eŭropanoj informojn el Eŭropa Unio kiuj estis haveblaj nur en la angla, aŭ foje en kelkaj aliaj lingvoj. Ankaŭ vi scias ke mi faris retejojn en naciaj lingvoj por homoj kiuj ne scipovas Esperanton : europeensemble.eu,(franca), europagemeinsam.eu, (germana), europa-insieme.eu.

De kelkaj tagoj ankaŭ ekzistas retejo en la hispana : europajuntos.eu. Mi esperas ke ne estas tro da eraroj en la artikoloj. Eble tiu titolo "europajuntos" ankaŭ estus uzebla por la portugala lingvo. Same kiel por la aliaj retejoj, viaj komentoj kaj proponoj por plibonigo estos bonvenaj. Se iuj el vi deziras kunlabori por prepari similajn retejojn en aliaj lingvoj, bonvolu sendi al mi mesaĝojn pri tio.

Pierre Dieumegard, Francio

========= vortoj:  1220 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.